

NOVA VORTARO PREPARATA

Estas sciante, ke iama redaktoro de „Litova Stelo“ Petras Čeliaskas nuntempe laboras pri la nova Litova-Esperanta Vortaro. Li afable konsentis respondi kelkajn demandojn pri la estonta verko.

Kia estos la preparata vortaro?

– Ĝi estos Litova-Esperanta Vortaro, la plej ampleksa el ĉiuj antaŭe eldonitaj similaj vortaroj. Ĝia bazo estas „Dabartinės lietuvių kalbos žodynas“, el kiu estas preterlasitaj nur dialektaj kaj tre malofte uzataj vortoj. Tamen estas enmetitaj multaj sciencaj terminoj kaj specialaj vortoj, registritaj en „Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto“. La nova vortaro havos preskaŭ 600 paĝojn (en formato A4) kaj ĉirkaŭ 40 000 vortojn. Do mi ŝatus nomi ĝin „La Granda Litova-Esperanta Vortaro“ (GLEV). Mi kompostas kaj enpaĝigas la tekston per komputilo kaj ĝi ne bezonos pluan redaktadon. Por litova kaj Esperanta tekstoj mi uzas diversajn litertipojn.

Mi imagas, ke estos impona libro. Kioma parto da laboro jam estas farita?

– Mi komencis de literoj A, B, C... Kaj nun mi jam ŝvitas en litero S. Post 2 – 3 monatoj, kiam mi finos literon S, estos faritaj 82 % da laboro. Mi povas aldoni, ke du literoj estis tre temporabaj. Litovaj vortoj kun komenca P konsistigas pli ol 17 %, kaj tiuj kun komenca S ankoraŭ 13 %, do tiuj du literoj okupos preskaŭ trionon de la libro.



Do ĉu vi jam vidas lumon en la fino de la tunelo?

– Preskaŭ mi vidas. Mi esperas, ke Plejal-tulo donos al mi sufiĉe da tempo por atingi la celon. Mi scias, kiel rapide mi povas labori. Unu paĝo postulas 2 – 3 tagojn, kvankam estas tagoj, kiam mi ne skribas eĉ unu linion. Miaj okuloj jam ne permesas sidi ĉe komputilo po 10 horoj ĉiutage, nur po 4 – 6. Tamen, se ne aperos iu nevenkebla obstaklo, mi kalkulas, ke en la unua duono de la jaro 2018 la laboro povus esti finita.

Kaj tiam la vortarego estos eldonita?

– Tio jam dependos ne de mi, ĉar mi ne havos eblecon zorgi pri la eldonado. Tio dependos de tio, ĉu litovaj esperantistoj bezonos la vortaron. Dume ne estas sciante, kia povus esti eldonkvanto. Ja de tio dependos la prezo. Eble iu organizos la eldonadon. Eble necesos fondi grupon por tiu celo kaj organizi anticipan abonadon. Restas ankoraŭ sufiĉe da tempo por ĉion pripensi kaj organizi.

Dankon por la respondoj.

JANUARA KUNVENO KUN SAMIDEANINO AUDRONĖ

La 26-an de januaro 2017 (kiel ĉiam la lastan ĵaŭdon de la monato) en Litova Ĵurnalista Hejmo (Vilno, Jogailos str. 11) okazis kunveno de Vilna Esperantista Societo. La ĉefa programero estis gratulado al nia membrino instruistino Audronė Maksimaitienė pri ŝia honora jubileo. La prezidanto de la societo Algimantas Piliponis enmanigis al ŝi enkadritan Honorfolion, kiu tekstis:

„Okaze de Via honora kvarobla 20-jariĝo ni dankas Vin pro Via longjara kunestado en la tutmonda Esperanto-familio, pro via amika partopreno en la agado de Vilna Esperantista Societo!

*Vi estis elstara pedagogo de blinda kaj vid-malkapabla junularo. Al ĝi vi instruis ne nur la Litovan lingvon kaj literaturon, la Germanan lingvon, sed ankaŭ la lingvon de popola amikeco – la Internacian lingvon Esperanto. Ja Via devizo ĉiam estis „Helpado de unu al alia, subtenado de unu al alia estas la vera vivoce-
lo!*

Ni bondeziras, ke al Vi, nia modesta jubileulino, neniam manku fortoj kaj deziroj por plua optimisma vivo!

Viaj samsocietanoj”

Por la vasta Litova esperantistaro ni prezentas la enciklopedian biografieton de A. Maksimaitienė:

Audronė MAKSIMATIENĖ-Staniulytė naskiĝis januare antaŭ 80 jaroj (la 14an de januaro 1937) en la urbo Kaunas, en familio de Jonas Staniulis, kantisto de Ŝtata teatro. En 1954 ŝi finis Kaŭnan Instruistan Seminarion kaj tuj ekstudis la Litovan lingvon kaj literaturon en Vilna Pedagogia Instituto (nun Litovia Edukologia



Universitato). Dum la lasta studjaro Audronė vizitis Esperanto-kurson, kiun gvidis docento Ipolitas Cieška. Post la studfino ŝi en la jaro 1958 ekinstruis en Kaŭnaj lernejoj.

En 1969 A. Maksimaitienė eklaboris en Kaŭna blindula internulejo kiel vic-direktorino kaj instruistino de Litova lingvo kaj literaturo. Samtempe ŝi foreste studis tiflopedagogion en Leningrada Gercen-noma Pedagogia instituto. Kiam en 1975 en la urbo Vilno estis establita lernejo por blinduloj kaj malbonvidantoj, A. Maksimaitienė estis direktita vicdirektori en ĝi. En 1994 la lernejo estis reorganizita al Litova Edukada Centro por Blinduloj kaj Malbonvidantoj. En ĝi A. Maksimaitienė laboris ĝis la jaro 2002 kiel tiflopedagogino. Samtempe ŝi prelegadis en diversaj sciencaj kaj praktikaj konferencoj pri gelernantoj kun perturbita vidkapablo. Pro ŝiaj meritoj al la Litova klerigado Prezidanto de Litova Respubliko Valdas Adamkus en la jaro 1998 honorigis ŝin per Unuagrada ordena medalo de Grandduko Gediminas.

Nia samideanino, merita instruistino de Litova kaj Germana lingvoj A. Maksimaitienė al nevidantaj Vilnaj lernantoj instruis ankaŭ Esperanton. Kun knabinoj de Jonynas-noma blindula lernejo ŝi partoprenis la Vilnan UK en 2005 kaj la 71-an Internacian Kongreson de Blindaj Esperantistoj (IKBE), kiu okazis en Vilno tuj post UK. Post tio, A. Maksimaitienė partoprenis en IKBE-75 (en Pollando), en IKBE-76 (en Aŭstrio), en IKBE-78 (en Ukrainio). Cetere, ŝi partoprenis kelkajn Litovajn BET kaj ĉeestis en multaj Zamenhof-tagoj, okazintaj en Kaunas. Ni vidis ŝin en Kunvenoj de Litovaj Katolikaj Esperantistoj (en 2015 kaj 2016). Kompreneble, ĉiuj kunvenoj de Vilna Esperantista Societo, kompreneble, okazas kun ŝia ĉeesto – pri ĉi tio ni sincere ĝojas.

Vilna Esperantista Societo

Doktoro BANAITIS 75-jaras

La familinomo Banaitis estas sufiĉe ofta familinomo. Oni scias pri gravuloj Salomonas Banaitis (signaturinto de Februara Akto), pri Mikas Banaitis (signaturinto de Tilza Akto), komponisto Valteris Banaitis k.t.p. Multaj litovoj kaj ne nur litovoj aŭdis ankaŭ la nomon Valdas Banaitis. Kio estas li? Ĉu nur konata esperantisto kaj sociaktiva psikiatro? Estas li publicisto, tradukisto el la lingvoj pola, rusa, esperanto, kultura historiisto, kaj verŝajne ne nur tiu.

Valdas Banaitis naskiĝis la 21an de februaro 1942. Antaŭ 75 jaroj do. En distrikto Zarasai, apud urbeto Dusetos. Kreskis li sen patro, kiu laboris en forsto de urbeto Švenčionys, kreskis kun avino kaj patrino. Kiam la patrinon Michalina Kuzmickaitė, kiu estis instruistino, la soveta potenco arestis kaj ekzilis al Karelio, la patro forsendis la infanojn al iliaj avoj en Jurbarkas. Nur en 1953 tuta Banaitis-familio kolektiĝis kune, jam en Kaŭno. Tie li finis mezlernejon kaj revis studi en Vilno, fariĝi serioza arkitekturisto aŭ lingvisto. Tamen, en la jaro 1959 la patrino venigis lin al Kaŭna Medicina Instituto. Tie Valdas specialiĝis pri psikiatrio. Post la studofino, de post 1965 li eklaboris (kune kun sia edzino Marytė) en la plej granda litova psikomalsanulejo, situanta en Naujoji Vilnia. Tie pasis multaj liaj jaroj en zorgoj pri alkoholuloj. Lastatempe V.Banaitis profesie agis kiel juĝantara psikiatro-ekspertizisto pri dependecaj malsanoj. La tutan kuracistan vivon lian atenton tenis problemoj de alkoholismo kaj sobrero, ankaŭ de skizofrenio. Sed ne nur! La tutan koncian vivon de Valdas Banaitis plenigis ankaŭ la lingvo Esperanto kaj la problemoj de lingvosperteco de esperantis-

toj mem. Kiel Valdas Banaitis esperantiĝis?

En la jaro 1957 la patro alportis el subtegmentejo de avo hejmo en Jurbarkas folion de antaŭmilita infana revuo „Kregždutė“ kun unu leciono de Esperanto kaj fabeleto „Pasero kaj kato“. La 15-jara Valdas kiel ŝaradon solvis la enhavon de la fabeleto kaj tiel komprenis kiel funkcias la lingvo. Poste li sukcese plenumis hejmtaskojn laŭ E-anguleto en la revuo „Švyturys“ kaj ekinstruis Esperanton al siaj samlernejanoj (estante studento – al siaj gekolegoj). V.Banaitis ekhavis pli ol 20 korespondamikojn el tuta mondo. La kontaktoj kun bone parolantaj esperantistoj, legado de E-literaturo, revuoj „Nuntempa Bulgario“ kaj „El popola Ĉinio“ helpis al li spertiĝi en Esperanto. Baldaŭ V. Banaitis distingiĝis kiel flua uzanto de la lingvo Esperanto.

Dum sia E-vivo Valdas Banaitis multe vojaĝis, aktive partoprenis en E-kongresoj, aktivis en Vilna E-klubo, gvidis literaturan rondon „Sinjoro Tadeo“, kompilis porinfanan E-kurson en la lernanta revueto „Kregždutė“, redaktis kelkajn E-eldonaĵojn de la geparo Lukoŝevičius, esperantigis verkojn de verkisto Jaronimas Laučius k.t.p. Lastatempe V. Banaitis propagas la ideon, ke por bona proprigo de Esperanto oni devas esti ne instruata, sed uzanta la lingvonmemstare, oni devas plonĝi kaj navigi en la literaturo kaj tiel akumulinte la leksikon fiŝe naĝi en ĝi.

Ĉar Valdas Banaitis ne povis veni en la kunvenon de Vilnaj esperantistoj, kie li devis esti honorata, al li elektronpoŝte estis sendita jena gratulteksto:

„Vilna Esperantista Societo deziras al la elstara jubileulo Valdas Banaitis, kiu nun festas sian 75-jaraĝan naskiĝtagon, ne nur la tradicion bonsanon, sed ankaŭ sukcesojn en la eluzado de siaj ebloj kaj kapabloj! Estu komprenata de viaj vivtempuloj! Ĉian bonfarton!“

Vilna Esperantista Societo

Signolingvoj. Kio estas tio? (1)

Signolingvoj. Kio estas tio? Ĉu iaj manmovoj por montri ion gravan rapide? Aŭ ĉu tio estas nur gestmontra formo de nia, sona, lingvo? En ĉi tiu serio de artikoletoj mi provos klarigi signolingvojn kaj ĝiajn aspektojn.

Do, mi komencu per demando: kio vere estas signolingvo? Esperanta Vikipedio jen kion skribas:

„Signolingvo aŭ gestlingvo estas lingvo kiu uzas la manojn kaj mienojn por komuniki, anstataŭ sonojn.”

Do, ni povas vidi, ke tio ne temas pri sonoj, kiujn ni kutime uzas ĉiutage. Do, kiel aspektas tiuj signolingvoj? Respondo estas simpla: movante. Uzante spacon ĉe korpo de signoparolanto, vizaĝ- kaj lip-movojn, mienojn, mimikojn kaj konfiguraciojn de mano oni povas tute same riĉe esprimi ideojn kaj pensojn samkiel en sonlingvoj. Tamen ili ambaŭ multe diferencas. Sed pri tio – en la sekvonta numero.

Oni kutime pensas, ke en la mondo ekzistas unu aŭ du signolingvoj kaj ĉiuj surduloj uzas ĝin. Sed tio estas granda malvero. Laŭ ies takso, ekzistas pli ol 130 signolingvoj en la tuta mondo. Povas ekzisti pli da ili, ĉar oni pensas, ke ekzistas ankoraŭ ne malkovritaj signolingvoj. Por mi mem ili estas tre interesa fenomeno. Kial?

Ekzemple, Brita kaj Amerika signolingvoj tiom multe diferencas, ke unu surdulo el Britio ne kapablas normale konversacii kun alia Amerika surdulo malgraŭ tio, ke la saman sonlingvon oni uzas en ambaŭ landoj. Kaj tute male okazus kun ruso kaj litovo – Litova kaj Rusa signolingvoj tiom multe similas (pli bone taŭgas „similetas”), ke konversaciado estas pli malpli komprenebla, sed ja amabŭ sunlingvoj multe malsimilas! Tiel okazis

pro Soveta okupacio – dum okupacio per televidilo oni kutime disaŭdigadis dulingvajn signointerpretaĵojn – Litovajn kaj Rusajn. Litova signolingvo do komencis similiĝi al Rusa signolingvo, tamen nur ĝis kiam okupacio finiĝis.

Ankaŭ interesa parto de ĉi tiuj lingvoj estas ke se du surduloj volas, ili povas facile interparoli, se teme pri pli longa ol du tagoj komunikado. Vi povas demandi - kiel? Tio okazas per kunlabora piĝin-kreado. Piĝinoj estas lingvoj, kiuj estis faritaj aŭ evoluiĝis mem de du aŭ pli da lingvoj. Do, konstruante sian propran piĝinon du surduloj el tute malsimilaj landoj kun tute malsimilaj signolingvoj povas interkomunikiĝi.

Kaj, por la fino, interesa fakto: ĉu vi scias, ke preskaŭ ĉiuj signolingvoj havas la saman signon SURDA? Jen ĝi:



Kurĉias



Povilas Jasiūnas

La postpaska festo „Rideto“

22-a de Aprilo, 2017

Ni invitas ĉiujn al la tradicia aranĝo de Šiauliai esperantistoj - „Rideto“:

Ni vizitos anĝelojn en la muzeo de Anĝelo, dum eduka programo ni kreas sian propran anĝelon el fibro de lino.

Reveninte de muzeo, ni konatiĝos kun la Nacia kostumo, tradicie rulos postpaskajn ovojn, elektos la plej belan kaj esperantecan ovon, ni kantos kaj ludos.

12:00-12:30 h. ni kolektiĝu en la ejo de „Šiaulių verslo inkubatorius“ (Aušros al. 66, Šiauliai)

13:00-14:30 h. muzeo de Anĝelo, eduka programo (Aušros al.48, Šiauliai)

15:00 h. ni revenas al „Šiaulių verslo inkubatorius“ (Aušros al. 66, Šiauliai)

15:30 h. Romualdas Laugalis, gvidanto de danc-ensemblo „Šėltinis“, prelegos pri la nacia kostumo, poste gvidos lecionon pri popola danco

La regalajoj kunportitaj kune: kaj de majstroj, ka de gastoj.

Partoprenkotizo 4 Eur (biletoj al muzeo kaj eduka programo inkluditaj).

Laŭ eblecoj beligu vin per naciaj kostumoj aŭ naciaj atributoj.

Kontaktoj por informiĝi kaj registriĝi:

Gediminas tel. 8 655 85735 retpoŝto: klubasruta@gmail.com

Liepāja – urbo de BET-53



La 53-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj okazos ekde la 1-a ĝis la 8-a de julio 2017 en Liepāja - la 3-a plej granda urbo de

Latvio (ĉirkaŭ 80 mil loĝantoj). Liepāja situas en la sudokcidento de la lando ĉe Balta Maro 220 km de Rigo.

Ĝi havas riĉan historion - unue menciita en la jaro 1253, urban rajton akiris en 1625, siajn spurojn en Liepāja lasis kaj svedaj reĝoj, kaj germanaj baronoj, kaj finnaj Jäger-volontuloj, kaj rusaj caroj. En 1919 dum la Liberiga milito Liepāja iun tempon estis ĉefurbo de Latvio ĉar al ĝi translokiĝis Latvia registaro.

Unika arkitekturo de Liepāja per diverseco de stiloj kreas specifan atmosferon karakterizan nur por tiu urbo - la plej grandaj kvanto da lignaj konstruaĵoj, multaj belegaj domoj de Germana arkitekto Paul Max Bertschy, stratetoj kovritaj per ŝtona pavimo. Tamen ne nur pri historiaj konstruaĵoj povas fieri liepajanoj - en 2015 ili akiris vastan kaj modernan koncerthalon „La granda sukceso”, ĉar ĝuste sukceso estas unu el simboloj de la urbo.

Liepāja allogas per multaj aferoj: la plej blanka kaj fajna sablo sur la strando; urboparto *Karosta* (Milita haveno) kaj ĝia historia armea malliberejo proponanta specialan spektaklon kun partopreno de vizitantoj - „Malantaŭ krado” (ne por homoj kun malfortaj nervoj); unu el la plej grandaj mekanikaj orgenoj en Eŭropo en luterana preĝejo de Sankta Triunuo (ĝis 1912 la plej granda en la mondo); katolika preĝejo de Sankta Meinardo - iama pavilono de Vatikano en la Internacia ekspozicio

EXPO 2000 en Hanovro, Germanio; Aleo de la Famo de Latvaj muzikistoj kaj multaj aliaj vidindaĵoj.

Oni nomas Liepāja ĉefurbo de Latvia muziko. Krom jam menciita Aleo de la Famo pri tio atestas multaj kun muziko ligitaj objektoj - la plej granda tamburo en Latvio, Arbo de Fantomoj, turisma itinero „Liepāja - kiel laŭ muziknotoj” k.a. La urba himno „En urbo kie naskiĝas vent’” dank’ al populara Esperanto-kantistino liepajanino Austra Pumpure estas bone konata al multaj esperantistoj. En Liepāja oni povas trovi grupon de skulptaĵoj dediĉitan al ĉiu strofo de la fama kanto.

Liepāja havas ankaŭ riĉan Esperanto-historion - Esperanto-societo tie estis fondita en 1925. Nun ĝi estas la sola urbo en Latvio, kie oni povas trovi straton de Esperanto.

BET-ejo de la 53-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj estos Mezlernejo No 6, situanta proksime de favorpreza hotelo kaj ne tro for de studenta hotelo de Liepāja Universitato. Informilon N-o 1 vi povas trovi en hejmpaĝo de Latvia Esperanto-Asocio. Tie jam ankaŭ funkcias la reta aliĝilo. Hejmpaĝo de Latvia Esperanto-Asocio: <http://esperanto.lv>.

Programo de BET-53 estos tradicia: diversnivela Esperanto-kursoj, enkonduka kurso en latvan lingvon, Somera Universitato, Sankta Meso en Esperanto, Interkona, Nacia kaj Internacia Vesperoj, duontagaj kaj tuttaga ekskursoj, kvizoj, filmoj, kantoj, dancoj k. a. aranĝoj.

Bonvenon al Latvio! Bonvenon al BET-53 en Liepāja!

Margarita Želve
Prezidantino de Latvia Esperanto-Asocio

Lingva anguleto

Kio doloras min?

Esperanto kalboje veiksmaĵodis *dolori* (skaudėti) yra galininkinis ir reikalauja galininko. Jo vartosena skiriasi nuo mūsų kalbos.

Kaip jūs esperantiškai pasakytumėte „man skauda galvą“? Tikriausiai išverstumėte pažo-

džiui: *al mi doloras la kapon*. Tai kitataučiam pašnekovui nekliudytų jus teisingai suprasti, bet šis esperantiškas sakiny yra netaisyklingas, nes jame nėra veiksnio. O kas čia yra veikėjas? Be abejo – galva. Mes galėtume sakyti ir „man skauda galva“ bei versti *al mi doloras la kapo*. Dabar čia yra ir veiksnys (*la kapo*), ir tarinys (*doloras*), bet papildinys (*al mi*) išreikštas naudininuku, o esperantiškai turi būti galininkas. Taigi *min doloras la kapo* arba *la kapo doloras min*. Mums, lietuviams, tai skamba keistai ir neįprastai, bet juk esperanto nėra lietuvių kalbos vertinys, ji turi savo logiką ir taisykles. Tokia logika pasidarytų suprantamesnė, jei vietoje „skaudėti“ pavartotume „skaudinti“, nes pastarasis veiksmožodis ir lietuvių kalboje reikalauja tik galininko. Tada sakiny „galva skaudina mane“ atrodytų visai logiškas, nors mes lietuviškai niekada taip nesakysime.

Yra dar vienas veiksmožodis, kurio vartoseną visiškai panaši: *juki* (niežėti). „Man niežti nugarą“ reikia versti: *la dorso jukas min*.

Petras Čeliauskas



Esperanto poštkruciŭo

Estas bonega novaŭo – MEA MASI (Moskva Esperanto-Asocio MASI) re-funkciigis la internacian aktivadon Esperanto-Poštkruciŭo!

6 - ☆ Litova Esperanto-Gazeto LEG'O ☆

En 2013 ĉi-distraŭon lanĉis Julia Samsnova okaze de la Internacia Tago de Pošto (kiu okazas la 9an de oktobro). La ago elvokis internacian intereson kaj eĉ trafis en la revuon *Esperanto* kiel nova junulara iniciato. Sed la aktivado estis porokaza, do, ĝi rapide estingiĝis. Tamen ekde tiam nin persekutis la ideo revivigi ĝin kiel konstantan esperantistan aktivadon.

Rigardu! Ĉu ne estas bona ideo sendadi belajn mansurskribitajn bildkartojn al la engaĝitaj esperantistoj, hazarde elektitaj de la aŭtomata sistemo? Ĉu ne estas agrable surpriziĝi trovi en sia ĉeporda poštkresto surkartajn salutojn en Esperanto de nekonataj samlingvanoj el ajnaj landoj kaj regionoj? Ni kredas, ke troviĝos multaj dezirantoj partopreni tiun amiksantan poštludon!

Eble, vi aŭ via Esperanto-lernanto estas tia homo? Tiam ne prokrastu – aliĝu tuj! Venu al la ĵuskreita paĝaro bildkarto.weebly.com kaj plenu tre simplan aliĝilon. Vi **tuj** ricevos retroŝte ies adreson! Elektu en papervendejo bildkarton, surskribu ĝin kaj sendu en la poštejo. Kaj atendu surprizojn en via poštkresto! Ĝuu belecon de la bildartoj kaj amikemon de esperantistoj el la tuta mondo!

Irina Gonĉarova
kunordiganto de MEA MASI

☰ Informo!

Ĉu vi ŝatas la gazeteton? Se jes (aŭ ne), permesu al ni scii tion – skribu por la zorganto de la gazeteto ĉion, kion vi pensas pri la gazeteto.

Vi povas aboni la gazeteton per retroŝto de la zorganto de la gazeto aŭ mem trovi ĝin en esperanto.lt kaj retroŝt-dissendolisto.

Sendu viajn artikolojn artikoletojn, rakontojn, vojaĝmemoriĝojn, pripensojn, ideojn – ĉion ajn skribeblon! Ni ĉion afiŝos en la sekvonta numero kaj ĝuos viajn skribaĵojn kune.

Gazeto dankas al Petras Čeliauskas pro redaktor-sperta helpo prepari la gazeteton.

Zorganto kaj kompilanto de la gazeto: Povilas Jasiūnas – povilasxworld@gmail.com